


EKO 2024

TRA LA
MONDO
IRAS FORTA
VOKO

Numero 2024:05, januaro 29. Pezo: Word 40, PDF 310 KB, AIK: 65, sume 410 KB

UEA aperigis la Unuan Bultenon por Aruŝa



Post la renkontiĝo okazinta en la urbo Aruŝa la Afrika Komisiono helpis al la kreado de nova Esperanto-klubo en tiu urbo. Ni fieras pri ĉi tiu venko, kiun estis malfacile atingi, sed ĉar ni prioritatis unuecon kaj kunlaboron, la afero sukcesis. La grupo havas almenaŭ 126 personojn; inter ili estas junuloj el diversaj urboj de Tanzanio. La celo de la starigo de la klubo estas interalie la preparoj por la 109-a Universala Kongreso.

La renkontiĝo ne sukcesos sen parolantoj de nia lingvo. Klubanoj ekstudis Eolecionojn, kiuj nun okazas interrete per la platformoj *Zoom* kaj *Jitsi*. Estas plano komenci fizikajn klasojn.

La reta kurso estas gvidata de Aimé Patrick Manirakiza, sed aliaj AK-anoj pretas helpi. Estas tiom da defioj, ke ni jam sendis petojn al la estrarano de UEA pri Afriko, por ke li helpu nin prepari por la bonaj instruadoj kaj etosoj.

La Afrika Komisiono estas laboranta kaj ĝis junio esperantistoj estos pretaj labori kaj volontuli por diversaj taskoj.

Aime-Patrick Manirakiza, Kunordiganto de AK

Privata opinio de SMG: La Kongreso JAM sukcesis! La agado de tanzanianoj estas jam inspira kaj esperiga. Sed, ĉu UEA pretas zorgi pri partoprenantoj el najbaraj afrikaj landoj? Ne decas, ke okazu UK en Afriko kun preskaŭ ekskluzive malafrikaj partoprenantoj! La afrika aliĝo por la UK en Afriko estas 15 tanzanianoj. Kie troveblas la multaj esperantistoj en Ruando, Burundo, Kenjo, Kongo DR kaj Zambio?



Ĉi tiu teksto estas sendita al UEA, ILEI kaj aliaj koncernatoj. Reago ne trovita.

Nova kurso en Tanzanio –plia frukto de UK Aruŝa

Reveninte hejmen, en la urbo Bunda, Mulele Mbassa tuj kreis Esperanto-grupon (BRILANTA STELO) ĉe vacapa babilejo, al kiu jam aliĝis 24 membroj, kiuj sekvas partoprene la ĉiutagan kurson escepte de vendredo perrete. La kurso okazas en du lingvoj (sŭahila kaj Esperanto) gvidata de s-ro Mulele Mbassa Makaranga.

Aliĝoj al Aruŝa bone progresas

En la 29-a de januaro aliĝoj por Aruŝa kreskis ĝis 342 personoj el 48 landoj: Germanio 43, Francio 33, Italio 21, Ĉinio 21, Koreio 19, Belgio 16, Japanio, Usono kaj Tanzanio po 15, Brazilo kaj Pollando po 14 kaj Svislando 10.

TEJO agas pretermovade per ‘Nivelkresk’ (Level Up)

La Komisiono pri Eksteraj Rilatoj de TEJO, danke al la partoprenado de TEJO en la Forumo Junulara Eŭropa (FoJE), invitas vin partopreni en *LevelUP!* 2024 per nia organizo kiu havas dek rezervitajn lokojn por partoprenigi TEJO-aktivulojn!

Okazigota la 12-an kaj 13-an de aprilo 2024 en Bruselo, *LevelUP!* 2024 estas dutaga aranĝo per kiu oni aliĝas al komunumo de Demokratiaj Ambasadoroj, kiuj plifortigas demokratiajn valorojn kaj antaŭenigas partoprenon en la Eŭropaj Balotoj. La evento inkluzivos eblojn konekti junulojn el la tuta Eŭropo kun eŭropaj politikistoj kaj decidfarantoj, interŝanĝi ideojn kun diversaj fakuloj kaj kunuloj, kaj disvolvi viajn proprajn agojn por antaŭenigi demokratian partoprenon.

Per TEJO rajtas partopreni iu ajn individua membro de TEJO, 16-35- jaraĝaj je la komenco de la aranĝo, loĝanta en unu el tiuj ŝtatoj de Eŭropo. Vojaĝo estos repagita, kaj estos kovrita loĝado kaj matenmanĝo en gastejoj ĉirkaŭ Bruselo (partoprenantoj dividos ĉambrojn). Informoj: <https://www.tejo.org/en/levelup-tejo/>

Brazilo bosanovas

En la Brazila Kolekto nia klera kolego Kikero kreis ĉi tiun kanton. **Cícero Soares** faris novan tradukon de la bosanovo *Promessas (Só em teus braços)*, verkita de **Tom Jobim**, kaj nomis ĝin *En viaj brakoj*.

<https://mail.google.com/mail/u/0/?hl=en#inbox/FMfcqzGwJmLJCMtvXbGxfbDxZjwXhJnL>



EDE kaj maltede

Daŭras la serio de EDE-prelegoj. Okazis reta prelego de la delonge aktiva hungarino **Andi Ottrok**. La prelego okazis en Esperanto, **en Jitsi Meet, en la 25-a de januaro**.

Temo: Kial mi daŭre estas esperantisto?

La programo estas anoncita ĉe la Eventa Servo de UEA.

La prelego estos videe registrita, kaj publikigita en la hejmpaĝo de EDE

<http://www.eszperanto.hu/ede/>.

Balkana kunlaboro

Rekomenciĝis la 20-an de januaro la kunvenoj inter la reprezentantoj de balkanaj landoj per raportoj pri la agado farita en la pasinta jaro kaj pri la planoj por 2024.

Unue raportis reprezentantoj de Rumanio pri la kunvenoj kaj kursoj organizitaj kaj aparte pri simpozio. Ĝojiga estas la apero de juna rumana esperantisto, memlernanto en la reto. Tio firmigas la opinion de Renato Corsetti, ke la ĉefa tasko de la rumana asocio estas aranĝi retan kurson pri Esperanto en la rumana.

Tion pruvas la sukcesoj de la serba asocio, kiu raportis poste, pri la junaj aktivuloj, kiuj venis el la retaj kursoj de la pasintaj jaroj kaj jam aktivas en la movado. En la raporto oni parolis ankaŭ pri la nun okazantaj kursoj kaj pri la aliaj agadoj planataj.

La reprezentanto de Ukrainio, Nina Daniljuk, raportis pri la agado en la propra universitato, en kiu okazas kurso pri interlingvistiko, kiun espereble sekvos kurso pri Esperanto, sed pro la malfacila milita situacio la Esperanto-agado en la lando paŭzas. Pli viglas la agado en Kroatio, kun ekspozicioj kaj kursoj kaj kunlaboro kun hungaraj esperantistoj, pri kiu raportis Marija Jerkoviĉ. Pri la jarfinaj aranĝoj en Hungario, pri prelegoj kaj pri eldonaĵoj raportis Ištvan Szabolcs el Hungario.

Renato Corsetti

Rumana simpozio okazis en Gherla fine de oktobro 2023

La Esperanto-Asocio de Rumanio, kune kun la rumana ILEI-sekcio organizis jaran aranĝon en la urbo Gherla. Partoprenis ĉirkaŭ 25 esperantistoj el Ĉeĥio, Hungario kaj Rumanio. La programo estis bunta kaj riĉa. La prezidantino Mariana Pitar raportis pri la agado de la asocio en la jaroj 2022-2023 kaj Aurora Bute raportis pri sia agado kiel estrarano de UEA.

La aranĝo celis sciigi pri internaciaj aranĝojn al la rumanoj kiuj ne partoprenis ilin:

- la Universala Kongreso en Torino (Aurora Bute)
- la Kongreso de ILEI (Mihai Trifoj kaj Mariana Berariu)
- ekskursoj dum la UK (Doina Popa)
- kelkaj interesaj prelegoj de la Torina UK (Adriana Dolca)
- la reĝa palaco de Torino (Petronela Birta)
- La 72-a Kongreso de KELI (Oldrich Fischer).

Dum la simpozio ni spektis interesajn kaj diverstemajn prelegojn:

- Pri la sanigaj proprecoj de mineraloj (Mariana Pitar)
- Vasili Eroŝenko - fama blinda ukraina esperantisto (Florica Popa)
- La viva estulo en la vizio de la dana filozofa Martinus (Mihai Trifoi)
- La unua rumano en Ĉinio (Florica Popa)

Mihai Trifoi lanĉis la duan eldonon de sia libro 'Kiel naskiĝis nova sperto -- de teorio al praktiko'

Okazis ankaŭ aliaj interesaj programeroj:

- libroservo
- kurso por progresantoj (Mariana Berariu)
- teatraĵo (Petronela Birta kaj Adrian Marginean)
- vizito de la urbo kaj muzeo
- vortludoj kaj distra vespero

Partoprenis rumanaj fervojistoj kiuj salutis nome de REFA (Rumana Esperanta Fervojista Asocio), kun kiu la landa asocio havis dum la tempo fortan kunlaboron.

Ondo pri la mondo

Ampleksa, bunta, kulture kaj movade riĉa estas la decembra eldono de la gazeto “La Ondo de Esperanto” (2023, N-ro 318). Konatiĝu kun la enhavo de ĉi tiu ampleksa, 144-paĝa eldono kaj decidu pri (re)abono por 2024.

<https://sezonoj.ru/2024/01/ondo-120/>

Legajtoj facilaj

Rekomendu ankaŭ al aliaj la legajtojn en nekomplika lingvaĵo:

<https://uea.facila.org/artikoloj/homoj/kio-okazis-kiam-oni-ordonis-la-instruadon-de-esperanto-en-lernejoj-r406/>

<https://uea.facila.org/artikoloj/lega%C4%B5oj/sukceso-pu%C5%9Das-homon-iri-pluen-r408/>

La Komitato de UEA sub la lupeo

Via EKO-komunikulo per pedanta statistikumado analizis la konsiston de tiu Komitato, kaj aldonas tion al kroĉe. Kvankam nefacile traktebla temo, oni devas almenaŭ konscii pri ĝi. Kiel skribis SMG aliloke, “eble pli gravas agado ol strukturoj”.

===== vortoj: 1095 =====

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek (NL), Elda Doerfler (IT), Frank Lappe (DE)



La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2800 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komunikulo estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <https://www.ilei.info/agado/EKO.php>

ALDONU Aŭ SUBTRAHU VIN: Skribu al <stefan.macgill@ce@gmail.com>..